

★  
**internacia  
pedagogia**

**REVUO**

Photo U.N.E.S.C.O.



Weissman n° 13.118

# Internacia pedagogia revuo

(eks *ESPERANTO* kaj *KULTURO*; *Internacia Pedagogia Revuo*)

Aperas dumonate sub la aŭspicioj de G.E.E., franca asocio de esperantistoj -edukistoj

## NIA KOVRILFOTO

### Disvastigo de Scioj

Sciencaj ekspozicioj pretigitaj de UNESKO estas sendataj al Membro-Ŝtatoj, kie ili alportas praktikajn sciojn al miloj. Sur nia foto, ekspozicio pri « Energio kaj ĝia Transformado ».

*(El la serio de foto-afiŝoj eldonitaj en Esperanto de UNESKO).*

## ENHAVO

- Paĝo 33. — **Ideoj pri instruistoj (Comenius).**
- 36. — **Problemoj pri talenta infano, 2<sup>a</sup> Socia kaj psikologia problemoj** (M. Boulton).
- 38. — **Vizito al Hungara Infanurbo** (P. Balkanyi).
- 40. — **Esperanto en la lernejoj.**
- 42. — **Otto Willmann** (E. Goerlich).
- 43. — **La floroj de l'malbono** (J.-P. Beau).
- 46. — **Amika pliproksimiĝo de instruistoj.**

**Ĉion por la redakcio:** artikoloj, informoj, recenzotaj libroj, oni sendu al la **Redaktoro:**

A. ALBAULT, 8, avenue Et. Billières  
TOULOUSE (Francio).

**Ĉion pri administrado:** abonoj, provsendoj, specimenoj, oni sendu al la **Administranto:**

DELAGNEAU, Avrolles  
par ST-FLORENTIN (Yonne) - Francio.

**ABONO:** 500 fr.F. pojare: vidu 3-an kovrilpaĝon.

**Anoncetoj, reklamoj,** oni sendu al: F-ino G. JOUBERT, 21, rue Regnault, SAINT-QUENTIN (Aisne) - Francio. P.C.K. LILLE 3041-30.

**TARIFO:** Anoncetoj; 6 fr.F. = 0,20 stelo po vorto aŭ mallongigo.

Reklamoj: 1/1 paĝo 5.000 fr.F.  
1/2 paĝo 3.000 fr.F.  
1/4 paĝo 1.600 fr.F.  
1/8 paĝo 900 fr.F.  
1/16 paĝo 500 fr.F.

Rabato 10 % por sama teksto en 2 numeroj.  
20 % por sama teksto en 3 numeroj.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi la koncernan adreson antaŭ la 20<sup>a</sup> de la antaŭa monato.

La revuo aperas fine de Januaro marto, majo, julio, septembro, novembro.

# KELKE DA IDEOJ PRI INSTRUISTOJ KAJ ILIA LABORO

En siaj didaktikaj verkaĵoj la fondinto de l'pedagogio novepoka JAN AMOS KOMENSKY ofte dediĉas atenton al instruistoj kaj lernej-direktoroj, el multaj vidpunktoj kritike pritaksante instruistan postenon, edukan kaj didaktikan laboron perfektan aŭ eĉ negativan.

En 1958, la jaro jubilea de Komensky, la tuta civilizita mondo rememoras, ke jam forpasis 300 jaroj de post la origina eldono de lia eminenta libro LA MONDO EN BILDOJ (Orbis pictus), la unua ilustrita lernolibro, presita en Nürnberg, kaj de tiam ofte reeldonata kiel unu el plej disvastigitaj libroj en la mondo.

La 28-an de marto, en naskiĝtago de Komensky, oni en Ĉeĥoslovakio celebris la Tagon de instruistoj, memorante la kortuŝan vivon kaj ampleksan verkaron de la granda pedagogo. Ĉi tiu okazo pensigas pri tio, kiel Komensky ŝatjuĝis instruistojn kaj ilian laboron.

## Kiel Komensky ĝenerale prijuĝis instruistojn


Instruistoj devas esti viroj honestaj, agemaj kaj diligentaj, vervoplenaj ekzemploj de virtoj, al kiuj ili devas klerigi ankaŭ aliajn, kaj tio ne hipokrite sed efektive. (Nenia hipokritaĵo daŭras ja longe). Ili estu konvinkitaj pri sia altgrade digna ofico, la majesta posteno, kiun nenio superstaras sub la suno...

LEGES SCHOLAE BENE ORDINATAE - 1653, ĉapitro XII  
(Leĝoj de lernejo bone ordigita)

## Instruistoj malbonaj

1. Despotema estas la instruisto, kiu donas al lernantoj taskon sen sufiĉa klarigo de la temo, ne montrante kiel procedi, nek helpante en iliaj spertprovoj, lasante ilin mem penlacigi kaj ŝviti; kaj se la lernantoj faras ion malpi bone, furioziĝas! Ĉu tio estas io alia ol turmentado de junularo? Tial: a) nenia punbato pro lernado, ĉar ne lernanto, sed la instruisto kulpas ne scipovante aŭ neglektante volontigi la lernanton por ke li fariĝu lernema; b) ĉio ellernenda estu prezentata kaj klarigita tiel solide, ke la lernanto povu ekposedi la taskon kvazaŭ palpante sur siaj kvin fingroj; c) por ke ĉio pli facile memorfiksiĝu, oni uzu kiel eble plej multe da sensoj.

DIDACTICA MAGNA, 1633-1638, ĉapitro XVII  
(Granda didaktiko)



2. Laŭnatura homa karaktero estas libera, amas spontanecon, konsterniĝas pro perforto. Kaj tial ĝi volantas esti gvidata tien, kien ĝi alcelas, sed ĝi ne emas esti tiregata, puŝata, devigata. El tio do rezultas, ke instruistoj malafablaj, despotemaj kaj punbatantaj estas la malamikoj de la homa gento kaj ke ili taŭgas nur al batmortigo de talentoj, sed ne al ilia edifo kaj nobligado. Ci tien apartenas ankaŭ la enu-sekaj kaj senfruktaj pedantoj, kiuj instruas nur kun helpo de kaduka regularo ne povosciante ardigi kaj fleksebligi la spiriton. Ili formas el lernantoj kreaĵojn apatiajn, kiuj strebas prevariki (1), aŭ kreaĵojn similajn al si mem, marionetajn figurojn. Do : la posteno instruista devas malhavi ĉiam kolerecon, ĉio devas esti farata kun patra favorkoreco. Le lernanto sentu, ke li estas amata kaj ne havas kaŭzon malkonfidi : amigilo devas esti la reciproka simpatio, instigilo al diligenteco — la interesiĝo pri objektoj kaj personoj.

LINGUARUM METHODUS NOVISSIMA, 1644-1647, ĉapitro X  
(Plej nova metodo de lingvoj)

### Direktoro de lernejo

1. Li memoru esti la lumo kaj ĉefkolono de tuta lernejo. Tial per virto kaj diligenteco li fariĝu la modelo, vivanta regularo (laŭ kiu ĉio nebona facile ordiĝas), por gardi la aŭtoritatecon super ceteruloj per siaj moroj, humaneco al ĉiuj kaj per senlaca persistemo en plenumado de siaj devoj. Ne havante propran instruklason, li estu konvinkita, ke ĉiuj klasoj estas liaj (tiaj ili ja estas), kaj ĉiutage li rigardu ilin ĉiujn kaj lumigu ĉiaflanke tiel, kiel la suno lumigas ĉielon...

2. Ciumonate la direktoro eniru ĉiujn klasojn por esplori per severa ekzameno, ĉu estis elstuditaj ĉiuj taskoj de la monato kaj kun kia diligenco.

3. Li estu historiografo de la lernejo kaj skribu en la kroniko pri ĉiuj gravaj eventoj. Sed se la temo estas pli grava, ne faru ion propra-arbitre, sed prefere kunvoku ĉiujn instruistojn kaj informiĝu pri ilia opinio.

4. Precipe li memoru kaj memorigu al siaj kolegoj, ke neniu fariĝas klera per iliaj nuraj receptordonoj, sed per ilia modela konduto por konstanta imitado de ilia ekzemplo : ili do deziru esti kaj prezentiĝi kiel vigligantoj de la spirito prefere ol nur kiel ĝiaj observantoj, kaj prefere gvidantoj ol diktatoroj, ĉar ĉi tio ne estas la lasta sekretaĵo de la didaktiko pli bona.....

LEGES SCHOLAE BENE ORDINATAE - ĉapitro XXII  
(Leĝoj de lernejo bone ordigita)

### Akomodo de instru-materialo al lernantoj

1. Instruisto devas instrui ne tiom, kiom li mem scipovas, sed nur tiom, kiom lernanto kapablas kompreni laŭ mezuro de sia aperceptemo... La mezurilo de l'instruado devas direktiĝi ne laŭ tiu, kiu instruas, sed laŭ tiu, kiu lernas. Konvena bazo kleriga estas la adaptiĝo de l'instruado al talento de la lernanto.

LINGUARUM METHODUS NOVISSIMA, 1644-1647, ĉapitro X  
(Plej nova metodo de lingvoj)

2. Se iu en vazeton kun mallarĝa kolo plenforte preferus verŝi ol gutige plenverŝeti, kiom li sukcesos ? Certe la pliparto da likvaĵo preterfluos kaj en la ujon venos pli malmulte, ol se oni verŝus gutrapide. Tute malracie agas tiu, kiu strebas instrui lernantojn ne kiom ili komprenas, sed kiom arbitre deziras li mem, ĉar la kapabloj volantas esti subtenataj, ne subpremitaj.

DIDACTICA MAGNA, 1633-1638, ĉapitro XVII  
(Granda didaktiko)

(1) *Prevariki* : Neplenumi, pro intereso aŭ trompemo, la devojn de sia ofico.

3. Lernantoj neniam estu troŝarĝataj per amaso da lernomaterialo : tiakaze ili kunportus nenion alian ol apation kaj spiritan indiferentiĝon. Ĉar same kiel tiuj, kiuj multon englutas, ne estas pli sanaj ol tiuj, kiuj manĝas nur tiom, kiom ili kapablas digesti, same tiel ne fariĝas kleraj tiuj, kiuj multe legas, aŭdas kaj memor-fikŝas, sed tiuj, kiuj legante, aŭdante kaj fiksmemorante, samtempe laŭorde kompreneme perceptas, konsumas, asimilas kaj ĝuste konvenigas al ĉia uzado. La instruisto neniam prenu do pli da lernomaterialo, ol eblas instrui en unu lekcio, klarigi kaj per koncerna ekzerco fiksmemorigi...

DIDACTICA DISSERTATIO, 1637, ĉapitroj 156, 164  
(Didaktika disertaĵo)

× × ×

*Jen estas nur kelke da pensoj pri instruistoj kaj ilia laboro el la verkaro de KOMENSKY, kiu kreis la sciencan pedagogion antaŭ pli ol 300 jaroj, migrante en ekzilo. Ni nun pripensu, ĉu ĝi ne konvenas tutplene al profituzo por instruistoj de nia kaj eĉ de estontaj generacioj.*

El la revuo « KOMENSKY » 3/1958 tradukis Jana Cichova (Praha).

---

## SUR VIAN LIBROBRETON

---

**Al la Venko**, de JOZE KOZLEVĈAR. *Historiaj eventoj dum 35 jaroj de esperanto-movado en Ljubljana. Eldonis Esperanta Societo Ljubljana 1956. 30 p. 14×18,5.*

Kun siaj sukcesoj kaj atingoj, malgraŭ la diversaj batoj de l'orto, la ljubljana esperantistoj konstante evoluigis la movadon en sia urbo, ĉiam celante al perfektigo organiza, lingva aj kultura. Ilia societo prezentiĝis kiel unu el la fajrujoj de esperantismo tra la mondo.

Jen broŝuro, kiun ĉiu gvidanto de E-Societo, devus legi kaj mediti. El ĝi li trovos inspiron kaj ekhavos novajn ideojn pri kion fari kaj kion eviti.

Lingve bona. (« direkta » devas esti « rekta » kurso; « firmao » estas ĉrare uzata por « ŝildo », « emblemo », « aŭspicio ») Bona prezento; tri fotoj.

A. A.

**Ni Legas kaj Lernas.** *Legolibreto por komencantoj kunmetita el la verkaro de D-ro LL. ZAMENHOF. Kompilis Julie Supichova. Eldonis Kroatia Esperanto-Servo. 39 p. 14×19,5.*

Jen zorge elektita specimeno el la diversaj verkoj de Zamenhof, frazoj el la Fundamento, kelkaj proverboj, anekdotoj el la Fundamenta Krestomatio; la « Knabineo kun Alumetoj » de Andersen, la « Komencanta monologo de Ifigenio de Taurido », fama peco el Hamleto (« Ĉu esti aŭ ne esti - ..... kaj ĉio restas penso, sed ne faro »), kelkaj lingvaj respondoj kaj fine « Vortoj de Zamenhof », t.e. kolekto de pensoj eliritaj precipe el la « Paroladoj » kaj el la studo « Esenco kaj evoluo de la ideo pri internacia lingvo ». Krome « La Espero » kaj listo de la verkoj de Zamenhof; tiu ĉi ne estas kompleta, mankas « La Leteroj » por citi nur la plej gravan.

Nuntempe tiu broŝuro povas tre utili kiel unua kontakto kun la verkaro de Zamenhof. La lernanto ĝi incitos plu legi tiun aŭ alian verkon : pli ol unu traduko estas malfacile havela; pri la originalaj verkoj ankoraŭ mankas en niaj bibliotekoj gvidilo kiu ordigus tiujn verkojn en sisteman, didaktikan tuton.

Jen broŝuro, kiun devus ricevi ĉiu lernanto de Esperanto almenaŭ ĉe la fino de elementa kurso meze de la dokumentaro, kiun ĉiu Societo devus liveri al li.

A. A.

(Sekvo paĝo 37).

**Marjorie BOULTON**

# Problemoj pri la talenta infano

## II. - SOCIA KAJ PSIKOLOGIA PROBLEMO

La ĉina poeto Su Tung-p'o, antaŭ preskaŭ mil jaroj, verkis poemeton pri la naskiĝo de sia filo. Ĝi tekstis proksimume tiel:

« Kiam infano naskiĝas, la familio esperas ke ĝi estos inteligenta. Mi detruinte mian tutan vivon per inteligenteco, esperas ke mia infano montros sin senscia kaj stulta. Tiam li kronos trankvilan vivon, iĝante ĉefministro ».

La ĉarmo de tiu ĉi poemeto kaŝiĝas sendube en la kontraŭpolitikista ironio; sed bedaŭrinde iom da pli profunda signifo troviĝis kaj ankoraŭ troviĝas en la versoj.

La talenta infano, pardoneble kvankam naive, iomete atendas ke la ekstera mondo ŝatos kaj utiligos lian talenton. Kio ofte okazos? La lernejoj gekamaradoj konstante mokas lin, forpelas lin, sufiĉe ofte turmentas lin fizike, ĉar ili ne ŝatas talentulojn! Ĉu pro simpla envio? Ĉu pro iu pli tragika sindefendemo? mi ne scias. Sed mi legis ke dum la mezepoko multaj senkulpaj homoj mortis per flamoj kiel « sorĉistoj » nur ĉar ili estis pli inteligentaj ol siaj najbaroj.

Mi korŝire ofte vidis, en lernejoj, ke la talenta infano estas malŝatata kaj persekutita.

Ju pli stultaj, krudaj aŭ senciaj estas la klaskamaradoj, des pli konstante kaj kruelintence ili turmentas la plej inteligentajn infanojn. Sed mi plurfoje vidis ke eĉ stabanoj malŝatis talentajn infanojn — se la infanoj suspektigis sin pri tro da talento, eble supera al tiu de la instruisto...

Eĉ en seminarioj mi plurfoje vidis similan sintenon, kvankam seminarianinoj kutime ne montras inklinon al korpa torturado. (Pri junaj viroj mi ne tiel certus...). Mi vidis multajn kazojn de kamarada kaj eĉ stabana antipatio al vere talenta junulino; kaj unufoje mi vidis studentinojn grave humiligi, publike, ĝentilan kaj ĉarman junulinon kies sola krimo estis, ŝajne, ke ŝiaj kapabloj iom elstaris.

Similaj reagoj sufiĉe abundas inter ni, tielnomite « maturaj » homoj. Kiom ofte, se iu diras pri alia, « Li estas tre talenta, li kapablas... k.t.p. » la alparolito respondas: « Jes, sed... k.t.p. »! Mi konas plurajn homojn kiuj havas la duban benon de elstaraj intelektaj kapabloj, kiuj ne havas gravajn aŭ al aliaj malbonfarantajn malvirtojn, sed kiujn kelkaj stultuloj konstante pikas, kritikis, ĝenas, eĉ foje vere persekutas.

Mi, kiu ŝatas talenton, ofte miris pri tiu ĉi stranga, paradoksa fenomeno. « Ĉu la talentuloj mem kulpas? » mi demandis al mi. « Ĉu eble ili estas arogantaj aŭ iel tre malagrablaj? » — Sed laŭ miaj ĝisnunaj observoj, talentaj homoj, eĉ talentaj infanoj, estas kutime malpli dogmemaj kaj fieraj ol stultuloj (ĉar ili komprenas ke ili malmulton scias, kaj la vera stultulo neniam atingas tiun scion); ili estas kutime pli ĝentilaj, ĉar pli edukeblaj; pli respondecaj kaj fidindaj; kaj, plej ofte, pli toleremaj kaj grandanimaj. Ili kutime servas siajn najbarojn pli ofte — ĉar ili havas la necesajn kapablojn — kaj plej kutime montras tiun apablecon kaj mildecon, kiuj fontas el abundo da psika potenco.

Kial, do, tiom da homoj malŝatas, eĉ malamas, talentulojn? Kial la plej bonaj intelektoj, kiujn la homaro urĝe bezonas, tiel ofte renkontas, ĉe la lernejo kaj en la matura vivo, nur malkuraĝigon, malŝaton kaj rektan malhelpon? Mi devas sincere konfesi, ke mi ne scias. Ĉu eble pro envio? — pro ia malsupera komplekso, tro ofta homa malsano? — pro ia praa perverseco en la homa menso?

Sed inter la problemoj de la edukisto, tiu ĉi problemo troviĝas. Se ni rekte defendas talentan infanon kontraŭ la malico de stultuloj, ili venĝos poste. Ni devas laŭ niaj ebloj ne nur eduki niajn gelernantojn al la sana konscio ke stulteco estas biologia hazardo kaj tial ne hontinda, sed al la same sana konscio ke talento, kvankam same hazarddonita, ne merita en si mem, estas bela beno kiun oni povas uzi por plifeliĉigi sin, la najbarojn kaj la homaron.

Kiel ni faru tion? Grandparte per nia propra sinteno. Parte per hero-adoro direktita al indaj herooj — grandaj sciencistoj, artistoj, reformantoj, por kontraŭbatali la

komercemotive stimulitan hero-adoron al la dudimensiaj herojoj de kinejo aŭ televido! Ne per tro ofta laŭdo al talenta infano: tiel ni eble nur viktimigos lin! pli efike, per niaj postuloj al tia infano. Ni povas iomete kontraŭbatali la stereotipajn bildojn de trianivelaj romanistoj, tiuj ŝatataj sed profunde malveraj bildoj de la « distriĝema profesoro », « freneza artisto », « potencavida sciencisto » k.t.p. Ni povas kapti okazojn por montri ke inteligento kaj scio havas praktikan valoron. (Kelkaj porknabaj aventur-rakontoj fakte helpas nin tie). Se miaj kolegoj havas aliajn praktikajn metodojn por valorigi talenton, en mondo kie poetoj povus eĉ nun ankoraŭ deziri stultajn infanojn, ili partoprenigu sian scion!

---

## SUR VIAN LIBROBRETON

---

**Jozefo.** *Drama poemo en kvar aktoj kaj epilogo, bazita sur la biblia rakonto. Prezento de Reto Rossetti. - La Laguna, J. Regulo eldonisto, 1957. - 120 p. 16×22,5. - STAFETO, Bel-literatura Eldon-serio, 10. Prezo: 1 us. dol. aŭ egalv.*

J. D. Applebaum, unu el la plej konataj pioniroj de nia movado, pioniris ĉifoje versan dramon.

Por tio li elektis bone konatan temon el la Biblio: Jozef, filo de Jakob estis vendita de siaj dekunu fratoj al sklavkomercisto. Sed en Egiptio li iĝas vicreĝo kaj tie akceptas la patron kaj la fratojn. Meze de la gloro, li ne hezitas reporti la korpon de sia patro en Sanktan Teron, obeante ties lastan volon kaj definitive forlasante ĉion.

Ni legas en la diversaj prezentoj, ke J. D. Applebaum sorbis la spiriton de la rakonto en la originala teksto mem. Ĉiokaze nepre estas sentata, ke la personoj de la dramo estas ĝuste la malo de konvenciaj figuroj: ili reagas ja kiel homoj en la ĉiutago povus reagi depende de sia deveno, kulturo, ktp, kun siaj celoj, pasioj kaj malfortoj.

En la epilogo la aŭtoro iĝas Jakobon paroli pri la malfeliĉo de la hebrea gento. Neniu pli bone ol J. D. Applebaum povis senti kaj verki ion tiel vibrantan kaj emociplenan pri la Abraham-posteulo:

*... la hebrea ĉiam laboras por fremdaj popoloj.  
Saĝajn leĝojn elpensas, mem suferas maljuston;  
Fortajn pontojn konstruas, kiujn li ne transpasas...*

Ni tre certe devas saluti tiun dramon, kiu plene honorigas nian literaturon. Mi tre ĝuis la legon sed kiel aludas Reto Rossetti en sia prezento, mi havas la impreson ke tiu dramo kun tiel vivecaj figuroj multon gajnus sur scenejo. Jen tasko por niaj Kongresoj.

× × ×

La verkon mem sekvas *Babilo pri Stafeto*. Tie la eldonanto J. Regulo Perez prezentas sian jam ses-jaran laboron, kiu tiel grandioze debutis per « Kvaropo » kaj jam donis al ni tiajn valoraĵojn kiel *Kontralte*, *La Infana Raso* kaj la *Eseoj de Waringhien*, kiuj nepre estu konataj de la ŝatantoj de la propra Esperanto-Literaturo. Jen do Jozef la 10-a volumo de tiu brila serio.

Al tio aldoniĝas jam la 1-a numero de la popularscienca serio: *La Vivo de la Plantoj*. Krome jam anonciĝas 20 novaj titoloj! Konkludo: Stafeto faris kaj faros utiligan laboron. Kvankam ĝi ne estas sola, ĝi tamen estas gratulinda ĉar ĝi surpris ne nur altnivelajn verkojn sed ankaŭ iom riskajn eldonaĵojn. Sed la publiko respondis: la unuaj verkoj elĉerpiĝis. La esperanta publiko kiel ĉiu alia, bonvolas eĉ sin ĝeni, kiam oni proponas al ĝi bonajn verkojn.

A. A.

La Raportadoj de I. P. R.

## Vizito al la Hungara Infanurbo

Laŭ invito de la direktoro de la nova Infanurbo hungara, prof. Lajos Barna mi veturis al vilaĝo Fót por viziti tiun belan instituton, **kiel kunlaboranto de Internacia Pedagogia Revuo**. La direktoro kaj kelkaj pedagogoj-gvidantoj tre afable akceptis min kaj mi povis vidi dum mia kelkhora ĉeesto la plej interesajn partojn de la hejmo de infanoj senhejmaj.

Similaj institutoj, precipe hejmoj por orfoj jam funkciis en la lando, sed tiun oni instalas speciale antaŭ unu jaro. La komenco estas interesa: en la redaktejo de Buda-peŝta sindikata ĵurnalo **Népakarat** aperis foje printempe virino kaj donis 50 forintojn por la celo, ke oni fondu hejmon taŭgan por tiaj infanoj, kiuj kreskas sen gepatra zorgo, inter netaŭgaj cirkonstancoj, por ricevi instruadon, edukon, eblecojn lerni diversajn laborojn akiri spertojn por la vivsubteno kaj trovi amuzadon, trankvilon, harmonion. La unua donaco egalas proksimume du dolarojn. Sinsekve aperis la alvokoj, proponoj kaj alluis la mono por la « infanurbo ». Dekmiloj da leteroj, regulaj donacoj, laboroferoj, memvolaj monkolektoj de infanoj - eble el mono destinita por kino, somerumado - multaj bonaj konsiloj sekvis unu la alian. La solidareco de plej diversaj homoj, la bona volo kaj la amo kun ofero kaj laboro fariĝis realo. La ŝtato disponigis iaman grafan kastelon kun granda parko kaj kelkcent-akrea grundo por terkulturado. La infanoj povas promeni kaj ludi en granda parko kun lagetoj, herbejoj. La unuaj geloĝantoj alvenis en novembro 1957 kaj solene transprenis la ŝlosilon de la kastelo. Okaze de mia vizito jam 240 infanoj 6-14-jaraj loĝis tie; por ili funkcias jam 30 lernejklasoj.

Mi demandis, kio estis la ĉefa celo? La respondo estis klara: « La socio ne povas toleri, ke senhejmaj infanoj kresku kaj vagadu en senama atmosfero, ke ili ne povu esti indaj membroj de la estonta socio, ĉar la varman homecon por la tuta vivo frostigis en ilia animo la krudeco de la infanjaroj. Ili havu komunan hejmon, kiu anstataŭ la familion, kiu ame zorgu pri ili, eĉ kiam ili jam forlasos la instituton. Ili lernu la estimon de la homo, de la laboro, de la scio, de la vivo. Ili lernu la solidarecon, la socian kunlaboron, la amon de la progreso, la estimon de la aliaj popoloj, la benon de la paco ».

Mi faris pluajn demandojn al la vere bonvola, klarrigarda direktoro:

**Kio ebligis la efektivigon?** — Grandparte la ŝtato mem, kiu donis 56 milionojn da forintoj kaj en la buĝeto estas pluaj 10 certigataj. La instituto apartenas rekte al la Kulturafera Ministerio.

**Kiuj fariĝis la gvidantoj kaj kunlaborantoj?** — Oni elektis el 300 sinproponoj, precipe tiujn, kiuj jam laboris en similaj institutoj kaj ĉiujn, kiuj pruvas veran amon al la infanoj. El la 28 pedagogoj estas 2 gvidantoj, 10 instruas en la lernejo, 12 edukas kaj gvidas en la hejmoj, 4 estas infanartistoj. La cetera, ankaŭ bonvola kunlaborantaro por la diversaj domaj laboroj estas 44, do entute 72 plenaĝuloj.

**Ĉu la nombro de la enloĝantoj kreskos?** — Oni celas atingi dum 5 jaroj, ke 200 estu en la infanĝardenoj kaj 480 en la ĝenerala lernejo. Por pliaj 14-18 jaraj estos studenta hejmo. Kiam ili vizitos superajn lernejojn, ili restos membroj de la Instituto, kiu zorge sekvas ilian vivon kaj laŭ neceso prizorgos ilin.

**Ĉu ili portas ian uniformon?** — Ne! ili portas bongustan tiel nomitan burĝan infanveston, similan por ĉiuj. La infanoj de la kunlaborantaro — la plimulto estas geedzoj! — partoprenas en la komuna instruado.

**Kion ili faras post la lernado?** — Ili jam havas 18 fakrondojn por amuziĝi kaj akiri spertojn en diversaj metioj, por studi arton, lingvojn. Grave estas, ke la infanoj travivu tion, kion ili lernas, studas kaj kun kio ili okupiĝas.

**Ĉu ili povas lerni ian profesion?** — Jes, jam estas kelkaj laborejoj por tiuj celoj. Ili ricevas preparon por sia plua vivo. Kelkaj povos eĉ resti en la instituto kaj tie daŭrigi sian laboron. Oni kondukis min tra la ĉambroj, ĉambregoj, lernejo, manĝejo, nokto- kaj dormo-ĉambroj. En ĉambrego — jama kavalira — mi povis al du klasoj fari paroladon pri Esperanto, pri ties utilo por amikiĝo, korespondado inter infanoj



kaj pri fortigo de la paco. Mi montris kunportitan materialon — ankaŭ IPR. Kelkaj infanoj interesiĝis kaj deziris lerni. Domaĝe mankas tie por tio instruisto kaj — lernolibroj.

**Kiel helpis la socio krom mono?** — Oni ne povas ĉion rakonti. Opaj personoj kaj institutoj sendis meblojn, vestojn, necesajn objektojn, instalaĵojn, eĉ radio — kaj televido-aparaton, ludilojn. — Oni montris al mi flegoĉambron, kie la infanoj ricevas kuracistan esploron kaj sanigon. La tuta ekipaĵo donacis la Germana Demokratata Respubliko, simile la instrumentojn por tuta ĵazorkestro kaj kvanton da violonoj kun ujoj. El Aŭstrio venis ekzemple kakao, ĉokolado, figoj k.t.p., en valoro de pli, ol dekmil forintoj por la junaj civitanoj.

Proksimiĝis la tempo, kiam ekiros mia vagonaro. Mi ne povis jam pli multon rigardi kaj noti. Sed mi devas tamen mencii **la Internacian Koridoron kaj tie Murgazet-tabulon. « Por kio servas tio? »** — Jen tio videble kompletigas la edukadon al spirito pli larĝvida, al ekkono de aliaj popoloj, al amikiĝo kun tiuj. Eduko al solidareco kaj paca kunvivado! — Kiam mi tie estis, oni povis vidi bildojn, fotojn kaj popolartajn objektojn el Ĉinio kaj Pollando.

Espereble venos baldaŭ el aliaj landoj. Espereble el kelkaj landoj sendos ankaŭ Esperantistoj! (\*) Plenaĝuloj kaj infanoj povas sendi ion ajn por montri sian solidarecon kaj amikecon. Ĉio, kio venas al adreso de la Infanurbo, estas sendogana. Oni povas sendi salutojn, bildkartojn, korespond-dezirojn kaj infandesegnaĵojn. Montru al tiuj progremaj infanoj, kiujn mi tiel amike rigardis, ke la popoloj formas grandan familion!

Sed adiaŭinte la direktoro diris: Nin multe interesus sciigoj, bildoj el similaj Infanurboj, institutoj alilandaj. Volonte ni sendos reciproke pri nia! — Kaj al mi reehas en koro lia resuma frazo pri ilia celado: « Mi volas, ke ĉi tie ĉiuj infanoj havu ĉiam ridetantajn vizaĝojn ».

P. BALKANYI, Budapest.

(\*) Adresu ĉion al : la Direktoro, Gyermekváros, Fót, Hungarlando.



## KOMUNIKOJ

de Internacia Ligo de Esperantistaj

Instruistoj

Ĉiujare en sia programo dum la Kongreso de U.E.A. la Ligo aranĝas diskutadon pri profesia temo por doni okazon al la gekolegoj el multaj landoj kompari spertojn kaj reciproke informiĝi. La nunjara temo estas : - « Instruistaj ferioj- ĉu tro longaj- ĉu oportunaj laŭ datoj- kiel uzataj ? »

La Centra Oficejo- 183, Woodlands Park Road, Birmingham, 30, Anglujo bonvenigos la nomojn de gekolegoj partoprenontaj.

La Esperanto-Uniĝo de Germanaj Instruistoj (Membro-asocio de I.L.E.I.) proponas du seminariojn dum la semajno 25-31 Julio, dum kiuj gekolegoj povos renkontiĝi en agrablaj ĉirkaĵoj.

Unu estos en Hustedt bei Celle (Hannover) por nordanoj, kaj la alia en Hasselborn (Taunus) por sudanoj (en kaj ekster Germanujo). Tiu en Hustedt okazos en Popolaltlernejo- pago proksimume 5.50 DM tage; tiu en Hasselborn aŭ sub tendo aŭ en najbara vilaĝo (proks. 6.50 DM tage). Ĉe Hasselborn estas projekto okazigi samtempe programon de la Internacia Geografia Asocio. Ĉar oni devas baldaŭ konfirmi aranĝojn, bonvolu skribi, kun r.k., pri aliĝo al Heinrich Müller, Hannover, Mommsenstr. 51, aŭ (por Hasselborn) al S-ino Bepperling, Wetzlar, Gr. Promenade, 2a.Germenujo.

### Listo de Rerezentantoj de I. L. E. I.

Bonvolu noti sanĝojn :

JAPANUJO : S-ro **Suzuki Kiyosi**, ĉe numero 820 (anstataŭ 816), Higaŝi-Ocizumi, k.t.p.

JUGOSLAVIO : S-ro **Borivoj Mihajloviĉ**, Panĉevo, Dimitrija Tucoviĉa 6.



# ESPERANTO en

## JUGOSLAVIO

*Pri esperanto ĉiel bazo por lernado de fremdaj lingvoj*

En Jugoslavio oni eksperimentas en kvin kvaraj klasoj de diversaj popollernejoj. Mi vizitis tiun en Butoracstrato, Zagreb, kie instruas profesorino Antonia Albert. Pro diversaj kaŭzoj la instruado ne povis komenciĝi tuj en la komenco de la lernjaro. Tial estis absolvitaj 28 lecionoj (45 - minutaj instruohoroj).

En la komenco la profesorino demandis esperante: « Infanoj, kion ni faros hodiaŭ? » Ili donis diversajn proponojn, sed la plejmulto estis por vendoplaco. Tuj estis starigita vendo-tablo kun fruktoj kaj troviĝis ankaŭ vendistino. Alsvarmis aĉetantoj, kiuj marĉandis kaj aĉetis. La dua decido estis labori per aŭtomobilo. La aŭtomobilisto tuj eklaboris ĉe sia aŭtomobilo (ludilo) kaj demandis, kion li faras. La gekologoj vigle respondadis. — La tria temo estis voĉoj de bestoj. Knabino faris demandoj kaj vokis la respondonton. Se iu ne respondis tuj, ŝi vokis alian. Post la respondo kelkaj infanoj hore imitis la blekadon de la koncerna besto aŭ pepado de birdo. — Kvara temo: tuŝado de diversaj objektoj en la klaso. La demandantino vigle demandis « Kion mi faras? » La demanditoj same vigle respondis. Se la objekto estis nova, respondis la profesorino, post ŝi kelkaj infanoj kaj fine la tuta klaso hore. Tiel la infanoj mem plilarĝigis sian scion. — Kvina temo: pre-

pozicioj. Lernanto prenis diversajn poziciojn rilate al diversaj objektoj kaj demandis: « Kie mi staras? — Tre interesa estis la laboro per flanelografo (\*). La infanoj kunmetadis frazojn. La eventualajn erarojn korektis la infanoj mem. — Fine grupo da gelernantoj dancis kaj kantis. Kunkantis la tuta klaso.

De la komenco ĝis la fino oni parolis nur esperante. Ĉion faris la infanoj mem. La instruantino nur de tempo al tempo « enĵetis » iun demandon por atentigi pri io. La tuta klaso estis unu labora kolektivo, ĉiuj partoprenis. La meriton havas ne nur la instruantino sed ankaŭ la klasestrino, sinjorino Ljubica Levak, kiu partoprenas la laboron kaj ankaŭ lernas mem.

Post la fino de la instruohoro mi prenis la parolon kroate kaj laŭdis la infanojn pro ilia bonega laboro kaj sukceso. Poste mi rakontis al ili pri la libraro en 15 volumoj, kiu aperis en Japanujo kaj verkis ĝin la infanoj de la tuta mondo. (La profesorino jam pli frue montris al ili la volumon, en kiu aperis la kontinuaĵoj de jugoslavaj infanoj). Fine mi dankis al sinjorino Albert kaj Levak pro ilia modela kaj sukcesplena laboro.

F. NOVLJAN.

(\* Vidu I.P.R. 1956, p. 23 kaj 41.



## POLLANDO

*Sinteno de la Pola Ministerio de Klerigo*

Demandita pri la sinteno de la Pola Ministerio de Klerigo al la afero « Esperanto en la Lernejoj », la Ministro, S-ro Vladislav Bienjkowski respondis: « Ekzistas tute reala ebleco organizadi esperantajn kursojn en la lernejoj por la junularo, kiu volas lerni tiun lingvon. La lernejoj aŭtoritatoj certe ne malhelpados. Inicito troviĝas en la mano de lernejestroj kaj esperantistoj ». En

la sekvo de la konversado, la Ministra Moŝto povis diri, ke krom morala helpo la Ministerio povas pagi esperantajn instruistajn seminariojn kaj eldonadon de esperantaj lernejlubroj. Tamen organizo- kaj verkado-taskoj estu zorgo de la esperantistoj mem. Niaj polaj amikoj do agu. (Laŭ « La Verda Vojto »).

# la LERNEJOJ



## DANLANDO

### *Oficiala permeso pri eksperimenta instruado de Esperanto en Danlando*

Lerneja Direkcio por la komunumaj lernejoj en Kopenhago donis permeson pri eksperimenta instruado en Esperanto en Vibenshus lernejo ekde venonta jaro en la deviga lecionaro.

4-a unuagrada klaso daŭrigos la instruadon dum 2 jaroj, tiamaniere ke la studado de Esperanto fariĝos preparo por la instruado de aliaj fremdaj lingvoj, simile al eksperimentoj en Skotlando kaj Jugoslavio.

La instruistino, Roma Thorsen, jam dum jaroj uzas Esperanton por praktikaj celoj en sia ordinara instruado, speciale en la geografiinstruado per interŝanĝo de diversa materialo por vigligi la instruadon. Ankaŭ

nun la Esperantoinstruado estos kombinita kun praktika instruado de geografio, ĉar ĉiusemajne oni disponigis geografiecionon por Esperantoinstruado kaj -praktikado. Krome oni permesis aldoni kromhoron al la deviga lecionplano por rekta esperantoinstruado. Dum 3 jaroj Roma Thorsen jam instruas Esperanton en tiel nomata hobiklubo ekster la ordinaraĵoj.

Eble la partopreno en la internaciaj rondoj de lernejaj gazetoj, Grajnjoj en Vento, preparis la grundon por la akcepto de tiu ĉi eksperimento, ĉar tiu laboro multe imponis al lernejaj instancoj kaj la gepatroj, kiuj en informaj kunsidoj unuvoĉe aprobis la eksperimenton.



## HUNGARUJO

### *El dekreto de la Kultursekcio de la hungara urbo SZEGED N<sup>o</sup> 1398/1957*

*Al la Direktoro de ĉiuj mezlernejoj, al la gvidanta Direktoro de la I.II.kaj III.distriktaĵaj instruaj institutoj.*

*Szeged.*

La Csongrád-departamenta Komitato de la Landa Esperanto-Konsilantaro petis de mi la enkondukon de la lingvo Esperanto en la mezlernejoj kaj en la du supraj klasoj de la ĝeneralaj lernejoj, kiel eksterordinara studfako.

(Sekvanta parto klarigas, ke tio nunjare ne estas ebla pro manko de koncerna ministra ordono).

Sed mi konsentas, ke en tiuj lernejoj, kie krom la interesiĝo de la lernantoj ekzistas ankaŭ la necesaj personaj kondiĉoj (\*), oni organizu grupon lernantan la lingvon Esperanton. La salajro de la profesoro instruanta la lingvon okazu el la pohora mono el la sumo, kion pagos la sinanoncantaj lernantoj.

Se estus pli vasta interesiĝo pri la lernado de la lingvo Esperanto, mi faros proponon al la Kulturfara Ministerio por permesi la

enkondukon de la lingvo, kiel eksterordinara studfako.

Pro la facila lernebleco de la lingvo Esperanto ĝi ebligas por la lernanto la korespondadon kun ĉiuj ŝtatoj de la kvin mondpartoj. Ĝi obligas la kreon de interrilatoj, la interŝanĝon de poŝtkartoĵoj, poŝtmarkoj, florsemoj, insektoj, k.t.p. kaj ĝustavoje gvidas la naturajn romantikajn klopodojn de la junularo.

La instruado de la lingvo estas do dezirinda ankaŭ laŭ kultura kaj pedagogia vidpunktoj ĉie, kie la necesaj kondiĉoj ekzistas.

(Fine li petas la distriktajn gvidantajn direktorojn fari la necesajn paŝojn en la lernejoj sub ilia direkto kaj sendi raporton pri la instruado).

Szeged, la 20-an de septembro 1957.

D<sup>r</sup> András KUNFALVI,  
mezlerneja referanto.

(\* Tio signifas, kie estas pedagogo povanta instrui la lingvon. (En nuna jaro nur en kvar lernejoj komenciĝis kurso !).

**Dro. E.J. GOERLICH**

# Otto WILLMANN

*Fundamentoj de lia pedagogia doktrino*



Inter la nomoj de la plej grandaj pedagogoj de la lasta-jarcento ankaŭ la nomo de Otto Willmann (1839-1920) daŭros. Li fariĝis jam en sia juneco profesoro en la pedagogia seminario en Wien'o (1868). Post kvar jaroj la germanlingva universitato en Praha (tiam ĉefurbo de la aŭstra lando Bohemujo) elektis lin kiel profesoron de pedagogio kaj de filozofio. Post 31 jaroj de instruado li rezignis kaj vivadis de 1903 ĝis 1910 en Salzburg'o. Ĉi tie li interesiĝis treege pri la projekto de katolika universitato. En 1920-a jaro li mortis en la bohema urbo Leitmeritz. La aŭstra instruistaro honorigis lin en la 1957-a jaro per fondiĝo de memorŝtono en la pedagogia seminario en Wien'o, kie Otto Willmann estis profesoro. La ĉefverko de la mortinta pedagogo estas « Didaktik als Bildungslehre » (didaktiko kiel doktrino de la sci-formo), publikita en 1882-a jaro en unua, 1886 en dua kaj 1909 en kvara eldono (en la eldonejo Vieweg en Braunschweig). Li skribis ankaŭ la grandan trivoluman verkon « Geschichte des Idealismus » (historio de la idealistaj filozofiaj sistemoj) kaj la libron « Aus Hoersaal und Schulstube » (El universitataj prelegoj kaj el la lernejoj), publikita en dua eldono en 1912 (en la eldonejo Herder & Co., Freiburg, Germanujo). La gloro de la aŭstra pedagogia instruisto disvastiĝis en la jaroj post lia morto per la laboro de la Wien'a universitata profesoro dr.o Wenzel Pohl (mortis en 1949-a jaro), kiu nomis Willmann la plej grandan pedagogon de nia jarcento.

La centra ideo de la pedagogiko de Otto Willmann estas la interkomunikaĵoj inter la individuo kaj la societo. La edukisto ne estu la ano de iu ajn doktrino, laŭ kiu la homo estas sola kaj unika sen bezono de aliaj gehomoj. La fundamento de la gehomare estas — ĉiam laŭ la doktrino de Willmann la familio. Li skribis: « La lasta elemento de la socia korpo ne estas la homo mem, sed la pli malgranda societo, la familio. La familio estas la plej malnova el ĉiuj sociaj societoj kaj samtempe la ekzemplo por ĉiuj aliaj » (v. Didaktik, p. 611). La gehomara komunumo aŭ la gehomara societo estas la interligilo inter la familio kaj la ŝtato. La eklezio estas la administranto de la supernaturaj aferoj de la gehomaro. La ŝtato estas la simbolo de la gehomara kolektiva volo. Willmann skribas en sia libro « Didaktik » (p. 614): « La ŝtato estas forta faktoro en la gehomara vivo; ĝi posedas grandajn taskojn kaj la plej grandajn ilojn, li influas la individuajn vivon kaj formas la societan vivadon; nur nacioj, kiuj fondis ŝtatojn, eniras la mondan historion kaj la nacioj, kiuj estas politikemaj, estas ankaŭ la gvidantoj ».

Sed la societo ne povas labori kaj funkcii laŭ Willmann, se ĝi ne garantias la vivadon de la individua homo. « La sci-forma laboro havas la taskon » — li opinias en « Didaktik » (p. 663) — « kunligi la valorojn de la kulturo en la prava maniero, por ke ili estu la liberaj elementoj de la individua spirita vivo kaj por ke ili tiel garantiu la daŭron de la kulturo ». Willmann volas, ke la instruisto uzu la individuajn pedagogikon, sed ke li ne forgesu, ke la individua pedagogiko ne estas la fino de la pedagogiko, sed nur la ilo, per kiu oni venos al la socia tasko de la gehomara vivo. « Oni rimarkas » — li skribas en « Didaktik » (p. 50) — « ke en kazo, en kiu la prava interkomuniko de la socia kaj de la individua koncepto de la edukado kaj de la sci-formo estas malĝusta, ankaŭ unu el la du taskoj de la pedagogiko estos malprava ». Se oni preferos la socian taskon, oni forgesos la edukon; se oni preferos la individuajn taskojn, oni forgesos la didaktikon.

Otto Willmann opinias, ke la socio ne estas maŝino, sed organismo. Ĉiu ajn societo ekzistas nur pro iu ajn valoro. Sen gehomaj valoroj ne eblas esti pedagogo. Nur la prava interrilato inter la individuo kaj societo ebligas la pravan funkcion de nia kultura kaj ŝtata vivadoj. Pro tio ankaŭ la laboro de edukisto estas plej necesa kaj plej valora en la gehomara societo.

## — Pedagogia Panoramo

Ni komencas aperigi artikolojn por tiu serio. Ni rezignas publikii ilin laŭ kronika ordo: mankantaj eroj tro prokrastigis. Tiel ni daŭre povos kompletigi.

Sevka artikolo: **Maria Montessori** de D-ro Prof. Vincenzo Musella.

# LA FLOROJ DE L'MALBONO

de Charles BAUDELAIRE



Kompleta eldono, rearanĝata, sekvrata de la « Defalaĵoj », kaj de fragmentoj. STAFETO, Belliteratura Eldonejo, n° 8-9. J. REGULO, eldonisto, La Laguna (Tenerife), Kanaviaj Insuloj, 1957.

398 p. 16×22,5 cm. Prezo: 2,40 us. dolaroj (35 steloj).

Esperantigis: Kálman KALOCSAY kaj Gaston WARINGHIEN, kun la helpo de Roger BERNARD, Magda CARLSSON, Hilda DRESEN, Lajos TARKONY, Henri VATRE.

Ilustrita per plenpaĝa portreto kaj foto de la aŭtoro.

Arta kovrilo de John HARTLEY.

La 15-an de Julio 1857, Brusela gazeto anoncis: « Tiu hida romano de Madame Bovary estas pieca legaĵo, kompare kun poemaro ĵus aperinta sub la titolo *Floroj de l' Malbono* ». Efektive, dum tiu jaro 1857, sin aĉe glorigis la etburĝa reĝimo de Napoleono III, kondamnante du geniojn de la franca literaturo: sep monatoj post la proceso de Gustave FLAUBERT, BAUDELAIRE ricevis monpunon, kaj la juĝo postulis la forigon de ses poemoj el la libro. La tiama ekzilita Juvenalo, Victor HUGO, skribis al la aŭtoro: « Unu el la malmultaj honoroj, kiujn la nuna reĝimo kapablas donaci, vi ĵus ricevis: tio, kion ĝi nomas sia ĵustico, kondamniss vin en la nomo de tio, kion ĝi nomas sia moralo ».

La proceso estis reviziita en 1949, kaj tiel rehonorigita la nomo de BAUDELAIRE. Sed ne tiel longe atendis la poeziamantoj; tiuj, ĝenerale, ne serĉas siajn motivojn ĉe la tribunaloj. Kvazaŭ tiuj montoj, kiuj malproksimiĝante kreskas, tiu-ĉi libro, kiu aperanta vekis ne grandan intereson, superstaras la modernajn tempojn. La Simbolistoj, MALARMÉ, RIMBAUD, CLAUDEL, VALÉRY, RILKE, aliaj alilande, kaj antaŭnelonge la Superrealistoj, ĉiuj trinkis el ĝia fonto; preskaŭ ne estas poezia tendenco moderna, kiu ne havas en ĝi sian radikon.

Kvankam ekflorintaj antaŭ jarcento, timige aktualaj estas la *Floroj de l' Malbono*. BAUDELAIRE, laŭ la vortoj de Théodore de BANVILLE, « akceptis la modernan homon tutan, kun ties defaletoj, gracia morbida, kaj sopiroj senpotencaj ». Tiu-ĉi analizo tute ne kadukiĝis. Vere, ke de tiam kompleksigi kaj ampleksiĝis la monda sceno, sed la teatra dekoracio, de la homoj plantita dum la vivo de BAUDELAIRE, ankoraŭ staras sama, kaj ne estas finita la komedio. Sur fono de grandurbego bruanta, de artefarita konstruaĵo monstra, svarmas, rapidas, enuas, maltrankvilas la estaĵoj. Tiun modernan maltrankvilon, Stafeto trafis difinas jene: « nekapablo resti en sia loko, deziro pri la nekonata, la malproksima, la neebla, ĉio miksitita kun profunda, mordanta konscienciproĉo pro la malprospero, la senfikeco, la forvaporigo

de la vivenergio ». Kiu en tiu pentraĵo ne rekonos la angoron de la nuna homa generacio? Ĝi kreskas en mondo, kie ŝanceliĝis aŭ forfalis la antaŭaj agnoskitaj kredoj kaj normoj, kaj ĝi strebe, iafaje freneze, serĉas sian novan vizaĝon inter la steloj kaj la polveroj. Abomeno al la mondo samtempa, obsedo pri ekzilo kaj orfeco, obsedo pri tempo-fuĝo, sopiro al sinforĝeso: « Necesas, ĉiam ebrii. . . Vi ne iĝu la martiraj sklavoj de la tempo, ebriiĝu, senĉese! per vino, per poezio, aŭ per virto, laŭplaĉe » (BAUDELAIRE, *Prozaj Poemetoj*). Soifo pri pureco, revo pri beleco. Unuafaje BAUDELAIRE esploris senkompatate, kaj esprimis malkaŝe, tiujn emojn profundajn, de la Romantikuloj nur surface altuŝitajn. Tiel en la *Floroj* eksonoris la voĉo de la homo moderna, kaj nenie pli perfekte. Poje tiu voĉo ŝajnas skandala, maldeca, senespera. Ĝin ne aŭskulti tamen vi ne povas, la voĉon angoran de nia epoko, kaj de tre granda poeto, ho vi

« Leganto hipokrita, - al mi simila - frata ! »

Dek jarojn laboris la tradukintoj. La du ĉeftradukintoj kaj redaktintoj oni ne rajtas prezenti en Esperantujo. Iliaj nuraj nomoj signas kaj garantias la nivelon de la entrepreno. Entrepreno grandioza, sed timinda: « La traduko de BAUDELAIRE », ili skribas en sia enkonduko (p. 43), « estas certe unu el tiuj malfacilaj taskoj, kiujn Zamenhof ĉiam insiste rekomendis al niaj tradukistoj: la klasika koncizo kaj romantika brilo de *Vesprimo*; la kompaktaj, pezaj sonoraj versoj; la mirinde arta kundensigo de pensoj kaj sentoj en la prizonon de l'formo; la preskaŭ muzika kompono, kie la senpenro per vokaloj kaj konsonantoj ludas tiel gravan rolon; la romantikaj riĉaj rimoj; la aparta gravo de la rimelekto por la emfazo de *Venhavo* - ĉio ĉi povas esti adekvate reproduktiita nur per ekstrema klopodo kaj nur en poezie matura lingvo. Sajnis do al ni utiliga, elmeti nian lingvon al ĉi-tiu severa provo ». Laŭdinda ambicio, kiu deziras, pli alten kaj pli foren porti la povojn de nia lingvo, kaj modeste ĝojas pri ĝiaj venkoj.

Ĉar komunikon pri venko oni povas afiŝi. En multaj okazoj, kiam la lingvo, sin pre-

parante al grava provo, kolektis kaj streĉis siajn fortojn, kvazaŭ kavaliro antaŭ la turniro, mia maltrankvilo akompanis ĝin ĉe la sojlo de la batalejo. Ĉu sukcesos la amato? Ĉu la ĉampiono ne tro memfidus? Tiun timon mi sentis unu pluan fojon, malfermante la verdeflavan kovrilon de tiu ĉi libro. Poste venis ĝojo, kaj emocio, Tian emocion povos ja senti ĉiu amanto de BAUDELAIRE, sed kiu pli akre ol franco maturaĝa, kiu dum siaj universitataj studjaroj malkovris, ŝatis, amis la poeton? Post tiom da jaroj, jen la silaboj, la rimoj, aperantaj en sia ĝusta loko:

« *En mia cerbo jen promenas  
Kiel en sia ĉambro varma,  
Kaj' bela, forta, dolĉa, ĉarma...* »

La poemaro, en sia verda vesto, elvokas la bildajn fantomojn de la studenta junaĝo, jen graciajn:

« *Mi ne forgesis nian dometon blanke brilan  
Najbaran al la urbo, malgrandan sed' trank-*  
[*vilan...*] »

jen korpreme malhelajn,

« *Nun saĝu, ho doloro, vin tenu pli trank-*  
[*vila,*  
*Vi volis la Vesperon; jen vidu, ĝi descen-*  
[*das...*] »

kaj BAUDELAIRE neperfidata, per versoj ne-forgesitaj, eksonoras aŭtentike:

« *La veksinal' ekkantis sur korto de Vka-*  
[*zernoj,*  
*Kaj vent' matena blovis la flamon de Vlan-*  
[*ternoj.*

.....  
*L'aŭroro frostotrema, en robo roza-verda,  
Alpaŝis malrapide sur Sejna ond' dezerta,  
Kaj jam Pariz' malhela sin frotis ĉe Vokulo  
Kaj kaptis siajn ilojn, maljuna laborulo.* »

Al tiu ĝuo beletra aldoniĝas ĝoja fido al la estonto de la lingvo, kaj dankemo al la talentaj, laboremaj, amemaj homoj, kiuj sukcesigis la provon, kaj tiel lerte donacis al ni ĉiuj « *en sia integra beleco la monumeton revitan de BAUDELAIRE, kaj interrompitan de lia tragika sorto* » (p. 40).

Talento kaj laboremon postulis la revizio de K. Kalocsay, rilate al la formo: la rezulto estas mirinde homogena. Povas esti, ke inter la pli perfektaj pecoj troviĝas malnovaj tradukoj, iam faritaj post elekto fervora de tre amata poemo: des pli laŭdinda estas la unueco de la tuto. Kvankam sep kunlaboris, oni konstatas, ke eĉ alilandeco kaj alilingveco (vidu ekzemple « *La Etaj Maljunulinoj* », tradukitan de Magda Carlsson, p. 205) ne malhelpas kiel cetere Kalocsay jam abunde pruvis - kiam sub la voĉo de la lingvo Esperanto flustras alia voĉeto sennacia, la poeziema inspiro. La vortaro estas riĉa, kaj pripensite aŭdaca. Estas rimarkinde, ke inter la 87 neologismoj nur

19 ŝprucas el neniu antaŭa fonto. Sciante, ke BAUDELAIRE ne malŝatis maloftaĵojn, strangan aŭ ekzotikajn vortojn, eĉ slangerojn, oni konsentos, ke la leksikoneto modestadas. Nenia kaprico en la enkonduko de tiuj novaj vortoj. La kverelo pri neologismoj iom kvietigis; ne tiu libro ĝin revekos, ĉar ĉiu sincerulo konfesos, ke ĉefverko, kia la *Floroj*, ne estas same konkerebla kiel la materialo de iu ajn gazetartikolo.

Gaston WARINGHIEN reviziis la tuton rilate al la senca fideleco. La kolegoj ne francaj, kiuj eventuale utiligos nacilinvajn tradukojn de la *Floroj* por sia instruado, certe trovos profiton en komparo, kion jam faris W. Auld pri angla traduko. Tiu-ĉi perfekte fidela kaj fidinda bildo de la penso de BAUDELAIRE certe helpos ilin dum kontrolo. Eĉ la majusklado de la linikomencoj, kritikita de recenzisto en *Norda Prismo*, estas, laŭ mi, fidelaĵo. Oni ne rajtas modernigi la aspekton de poemo: la manko de interpunkcio je la fino de la verso sufiĉe bone indikas, ke la senco ne haltas tie.

Pri poetiko mi ne estas spertulo. Nur mian laikan plezuron mi povas esprimi, kaj ĝin mi proklamas. La Aleksandron, nun tute elpruvitan, mi ŝatas; sed ĉu estas hereze, senti bedaŭron pri la maloftiĝo de la vira rimo? Tute certe, kiel la tradukintoj konstatas en la enkonduko, « *al la karaktero de nia lingvo pli konformas la virinaj rimoj* ». Konfesante, ke banala kaj kvazaŭ mekanike kripliga estus konstanta apostrofiĝo de la finoj, mi ne povas ne admiri la « *tondran batadon* » de la vira rimo en la « *Horloĝo* »:

« *Horloĝ'! Fatala dio, terura, senkompata!  
Per fingro ĝi minacas: « Jen tempo por*  
[*memor'!*  
*Vibrante la doloroj en via tima kor!*  
*Sin plantos baldaŭ kiel en disko arkapata!* »

Kaj mi devas opini, ke tie-ĉi, dank' al la foresto de la fina -o, kiu « lantigus », kaj obtuzigus la finon de la verso, la traduko de la sono kaj intenco fidelas ankoraŭ pli streĉe.

Recenzisto nekritikanta ne estus vera recenzisto. Sed nur etajn detalojn oni tie-ĉi povas kritiki, ekzemple la romajn ciferojn, malfacile legeblajn. Eble alia fidelaĵo? Oni perdas tempon, kalkulante la ĝustan nombron, por trovi la noton. Eĉ la preskorektilton eskapis eraro sur paĝoj 119-120. Kompatu do la rome nelertan leganton! Flikvortoj ja ne tute forestas, sed estas maloftaj (vidu: *ornami*, p. 230; *en oreloj*, p. 68). Kaj cetere mi bonvole konfesas kun Hugo, ke « *La belaj versoj, kiel la belulinoj, rajtas neglekteme malkaŝi siajn flikojn* ». Tiel prezentante alian malfacilan problemon al tradukonto, ĉar ĉi tie Hugo ludas per la franca vorto « *cheville* », maleolo ĉe la belulino, kaj por la verso ŝtopaĵo!

La longa enkonduko (36 paĝoj) prezentas elvokivan biografion de la poeto, kaj

la antaŭajn eldonojn de la verko. Du eldonoj aperis dum la vivo de BAUDELAIRE. Kvan-kam en la tria (1868) la amikoj de la mor-tinta poeto provis aranĝi la poemojn laŭ lia deziro, estas fakto, ke ili ne tute sukcesis. Ĉu oni povus retrovi kaj prezenti la veran ordon, de la poeto revitan? Allogitaj de tiu bela tasko, kaj neignorante la kritikeblecon de iu ajn propono, la redaktintoj aŭdacis ĝin entrepreni. En detala analizo ili studas la arĥitekturon de la verko, kaj pravigas siajn elektojn. Estas esperinde, ke specialistoj de BAUDELAIRE pridiskutos tiun laboron. Tie-ci oni nur akcentu, ke ĝi liveras al la Esperantista publiko *veran eldonon kritikan, kompletan verkaron* de tre granda poeto, kun fragmentoj, kaj notoj.

Sinjoro Juan Régulo Pérez, la eldonisto, ne ŝparis sian penon por inda prezentado. La senerara klara presado, la larĝaj mar-

ĝenoj, la plenpaĝa aŭtorportreto de Deroy, lerte fotita, estas agrablaj al la leganto. Kuraĝa dankinda Stafeto! Ĉu li pravas, fidante la klerecon de la esperantistaro? Tion mi deziras kredi: jam elĉerpigis pluraj antaŭaj numeroj de la kolekto, kaj mi mem bedaŭras, ke mi ne decidigis sufiĉe frue, kiam *Kvaropo*, nun elĉerpita, aperis. Mia bondeziro estas, ke ne ĉiuj mendontoj ricevu ekzempleron de la unua eldono, kaj ke baldaŭ alia sekvu. Granda pri la elekto, granda pri la realigo kaj la kritika aparato, tiu-ĉi libro prenas sian lokon sur niaj bretoj apud la ĉefverkoj de nia traduka literaturo. La publiko bone komprenu, ke la apero de tiu-ĉi eldono de la *Floroj de l'Malbono*, je la centjara datreveno de la unua, estas prestiĝa beletra evento, kaj unu el la plej altrangaj ĝisnunaj atingoj de nia lingvo.

J.-P. BEAU.

---

## De la Redakcio

---

### NI RICEVIS :

**Chronique de l'Unesco**, Avril 58. — Entenas interalie: Deklaro de granda graveco pri la reciproka aprecado de la kulturaj valoroj de Oriento kaj Okcidento p. 119-128. Instruado pri U.N. p. 129-134. Sur p. 135 informoj pri la XXI-a internacia Konferenco de Publika Instruado (Genevo, 7-16 julio 58); en la tagordo: programoj de la unuagrada instruado; eblecoj de edukado en kamparaj zonoj; ktp. Sur p. 144-147 informoj kaj komentoj pri nova publikaĵo pri la negra problemo. ktp...

### NI AŬDIS :

**Radio Roma** en sia elsendo de la 5-a de Marto (Kuriero de Esperanto) diris kelkajn laŭdajn vortojn pri IPR. Koran dankon. Akurate aŭskultu tiujn interesajn kaj variajn elsendojn kiuj okazas marde, merkrede, vendrede de h. 18-a 55 ĝis 19-a 10 (M.E.T.) sur ondlongoj 30,90 - 41,24 kaj 50,34 m. Skribu al Radio Roma Esperanto-Fako, Casella Postale 320. Roma (Italio).

★

## Oni Sciigis

---

La fondo de

### INTERNACIA VEGETARA KOLONIO

bazita sur: 1. laŭnatura terkulturado; 2. vegetarismo; 3. sennaciismo, kaj; 4. Esperanto uzata kiel oficiala kaj komuna lingvo estas realigebla, se organizos sin « pioniroj » en grupoj laŭ la manieroj de la Israelaj « pioniroj », kiuj fondis la « Kibucim » (Laboristaj Kolektivoj).

Interesuloj skribu al la sekretario I. Dorn, Tel Aviv, P.O.B. 2460, Israel, aŭ kontaktu Gilbert Ledon, Avenida Patria 1377, Apt. 2, Porto Alegre, Brazilo.

**Printempa E-restado en Perlora, Asturio (Hisp.)**, (1-14 Jun. 58). — Agrabla ferirestado ne tro kosta dank'al helpo de la hispanaj sindikatoj. Urĝe skribu al: Esperantista Klubo Nordo de « Educación y Descanso », 10 Str. San Juan, Oviedo.

# POR AMIKA PLIPROKSIMIĜO DE INSTRUISTOJ TUTMONDE

(En Praha kunsidis Administra komitato de FISE)



Fine de decembro pasintjara kunsidis en Praha, Administra komitato de FISE (Fédération Internationale Syndicale d'Enseignement), la federacio de edukistaj sindikatoj, kiu traktis pri taskoj de instruista movado sindikata deponst la konferenco en Varsovio. Paul DELANOUE, sekretario de FISE, konfirmis laŭ la prosperado de instruistaj sindikatoj, ke nur la kunlaboro de instruistoj kun laborista klaso kapablas sekurigi novan evoluadon de lernejaroj kaj plibonigi la situacion de instruistaro. Por ĉi tiu vidpunkto pledas ne sole la naciaj sindikatoj de instruistoj, kiuj estas membroj de la Mondfederacio de sindikatoj, sed eĉ multaj aŭtonomaj organizaĵoj, ekzemple en pluraj landoj en Afriko, en Ĉilio, Japanujo, Brazilio.

Cellkonforma ekzemplo de la kunlaboro de lernejo kun familio estas la zorgoplene preparita kunveno de dekmil instruistoj kaj gepatraj delegitoj, fine de januaro en Tokio, pritraktanta edukajn problemojn de japana lernejo kaj subtenanta la reziston de japana instruistaro kontraŭ diversaj malprogresemaĵoj aranĝoj de registaro en la edukistaro kaj en aliaj fakoj de la publika vivo.

FISE jam ekde sia fondiĝo kiel sian ĉeftaskon konsideris organizi la partoprenon de instruistaro favore al laboristaro, la plej progresema socia klaso — prospere al junularo kaj al la instruistaro mem. En kapitalistaj ŝtatoj ne estas facile volontigi ĉiujn instruistojn por kunlaborado kun laborista klaso, ĉar la instruistoj pro sia klerigo kaj vivmaniero apartenas al tiuj tavoloj de la socio, kiuj ŝanceliĝas inter la mondkonceptoj de la laborista kaj burĝa klasoj. Tiu ĉi fakto faras la persindikatan laboron inter instruistoj tre komplika, postulante diversajn formojn de procedo, organizado kaj de agmanieroj en landoj socialistaj, kapitalistaj, kolonihavaj kaj en tiuj, kiuj liberiĝis el fremda superregno. Al tio devas akomodigi FISE kaj serĉtrovadi tiajn labormetodojn, kiuj kondukas aŭ kondukos al fortikiĝo de la instruista unuigo tutmonde dum la ofensivo por demokrata lernejo.

En multaj kapitalistaj landoj la instruistaro penas pri postuloj, kiujn entenas la programo de FISE. Kun ĉi-tiuj organizaĵoj nia internacia sindikata asocio rilatas en ĉiam pli larĝa kunlaboro, sed firmigis kontakton eĉ kun la organizoj, kun kiuj nin ligas nur konforma opinio pri demandoj akcesoraj.

Dum la kvartaga traktado la Administra komitato de FISE ankaŭ diskutis pri la laboro-metodoj de instruistoj kaj de ilia fakorganizado en landoj, kiuj liberiĝis el kolonia regado. La tasko de instruistaro en tiuj landoj havas siajn apartaĵojn kaj ne estas facila. Unuflanke oni subtenas politikon de la registaro kontraŭ ekonomiaj pozicioj de fremda imperialismo kaj la disvolvigon de nacia lernejaroj, sed samtempe oni devas interveni por siaj justaj pretendoj, kiujn la novaj registaroj, plejparte kombinitaj de nacia burĝaro, kutimas ignori. La instruistaj organizaĵoj de landoj akirintaj sendependecon plej ofte rilatas kun FISE subteninta ilin kontraŭ kolonia subpremado.

La plej obstina antagonisto de la internaciaj instruistaj unuigoj kaj solidareco estas « Tutmonda konfederacio de instruistaj organizaĵoj », iniciatita de Usonaj monopoloj. Tiu ĉi organizo posedas riĉajn financrimedojn kaj eluzas ilin por unu el siaj ĉefceloj, por la detruo de la konkordo ekzistanta inter FISE kaj ceteraj internaciaj organizoj de l'instruistaro. Samtempe ĝi strebas spritigi la progreseman instruistaron de Latina Ameriko kaj kun helpo de koruptitaj instruistestroj fondi spitorganizaĵojn. La procedo de la Administra komitato konvinkigas, ke FISE sukcesos malebligi ĉi-tiujn planojn mونسubtenatajn de la menciitaj monopoloj.

La Administra komitato de FISE detale pridiskutis samtempan situacion en la internacia sindikat-instruista asocio kaj proponis, per kiuj taskoj FISE devus okupiĝi en plej proksima estonteco. Antaŭ ĉio estas ellaborenda por la Mondfederacio de sindikatoj la vidpunkto de FISE pri la samtempaj lernejaraj problemoj, kiu estus adekvata al vidpunkto de laboristoj, ĉu membroj aŭ nemembroj de la Mondfederacio de sindikatoj. Ĉi tiu vidpunkto povus fariĝi la fundamento por komuna intervenado de laboristoj kaj instruistoj dum klopodado pri progresigo de lernejaroj kaj por la defendo de instruistaj interesoj.



En la konferenco de la Administra komitato en Praha estis akceptitaj kelkaj gravaj rezolucioj kiel direktivo por plua agado de FISE: « La Administra komitato de FISE, konvinkita, ke la evoluo de lernejaro interesas ne sole instruistojn, sed ankaŭ ĉiujn gepatrojn kaj precipe laboristan klason », diras la ĉefrezolucio, « bonvenigas la iniciaton manifestiĝantan en Ĉilio, Japanujo kaj en aliaj landoj, kie laboristaj organizaĵoj okupiĝas pri lernejaraj problemoj. Ĝi opinias, ke per la kunlaboro de la Mondfederacio de sindikatoj plifaciliĝus la interŝanĝado de spertoj jam akiritaj samkiel de tiuj, kiuj disvolviĝos dum la kunlaboro de instruistoj, gepatroj kaj laboristoj ».

Post favora pasintjara sperto la rezolucio proponas celebri la dudekan de novembro 1958 kiel la Tagon de instruista ĉarto. Tiu ĉi tago, aŭspiciata sub egido de la interrilata komitato, por ĉiuj internaciaj organizaĵoj instruistaj devus fariĝi manifestaĵo de unueco kaj komuna procedo tutmonde.

Car FISE per ĉiu sia agado subtenas kunlaboron de instruistaro, ĝi konsentas ke okazu renkontiĝo inter ĝiaj delegitoj kaj la reprezentantoj de Tutmonda konfederacio de instruistaj organizaĵoj. FISE daŭrigos la interŝanĝon de instruistaj delegacioj el diversaj landoj kaj subtenos kontraktojn inter naciaj centrejoj de instruistoj. Similajn kontraktojn jam faris ekzemple la instruistaj fakorganizaĵoj el Sovetunio, kaj Anglujo. FISE subtenos ĉiun iniciaton akcelantan la evoluon de liberaj kontaktoj regionaj, kiuj disvolviĝas ekzemple en Latina Ameriko, inter Arabaj landoj, en Azio kaj Afriko. Ankoraŭ pli zorgeme ĝi atentos la porinstruistan edukon, celtrafe konceptitan al demokrata edukado de junularo. Estus dezirende al unu el ĝiaj kunvenoj inviti reprezentantojn de pedagogia scienco kaj detale okupiĝi per la metodoj akcelantaj la edukadon de demokrata junularo.

La Administra komitato plue akceptis la rezolucion helpe al Movado de junaj instruistoj, en kiu oni ankaŭ proponas ebligi partoprenon en Tutmonda konferenco de laborista junularo en Praha en julio 1958 kaj la rezolucion pri garantiigo de la paco.

La minaco de neimageble neniiga atommilito alarmas la konsciencon de la homaro kaj unuigas ĉiam pli kaj pli multe da decidiĝemaj batalantoj kontraŭ la iniciatantoj de nova milito. Inter ĉi tiuj batalantoj, konfirmitaj de la Manifesto de la paco, kiun subskribis komunistaj kaj laboristaj partioj el la tuta mondo, senĉese ariĝas pli multe da instruistoj. La instruistoj kaj ĉiuj edukistoj en nuntempo serĉas ankoraŭ pli efikajn rimedojn, per kiuj ili povus je siaj postenoj kontribui al senarmigo kaj al firmigo de la paco en la mondo.

FISE mobilizos la instruistojn tutmonde, por ke ili kunhelpu al sukceso de la Kongreso por senarmigo kaj internacia kunlaboro, kiu estos kunvokita de Tutmonda packonsilantaro ĉe fino de la unua duonjaro 1958. En la kongreso ankaŭ la voĉo de instruistoj laŭtiĝos por defendo de la paco kaj estos prezentitaj konkretaj proponoj, kiel pli efike edukadi junularon en spirito de internacia kunlaboro por la paco.

El « Učitelské noviny » 2/1958 tradukis Jana Cichová (Praha 9).

*I.P.R. estas libera tribuno. Aperigo de iu ajn artikolo ne donas indikon pri nia sinteno : nur la aŭtoroj respondecas pri la enhavo.*

## LA INSTRU-PROBLEMOJ TRA LA MONDO

La abundo de materioj devigis nin prokrastigi la daŭrigon de tiu serio kun la artikolo de F. CADENEL pri franca instruado.



# ESPERANTO ĈE LA DUA AMERIKA KONGRESO DE BLINDULOJ

(Montevideo, 3-8 mar 58)

La montevideaj ĵurnaloj raportis ke la amerika kongreso de blinduloj enmetis por diskuto en sian tagordon la temon « Enkonduko de Esperanto kiel familia lingvo inter la blinduloj ». Komprenu : « kiel lingvo de la blindula familio ».

Sekve la Urugvaja Esperanto-Societo delegis Prof. Manuel Fernandez Menendez kiel sian reprezentanton en la kongreso. Li partoprenis en la laboroj de la dua Komisiono (pri Kultura Devastigo) en kies temaro troviĝis la punkto pri Esperanto. Ekzistis favora sinteno al la internacia lingvo kaj estis decidite trakti ĝin unua. Raportistino legis la eksponon de la motivoj verkitaj de la aŭtoro de la propono S-ro Byron L. Eguiguren Ordonez (el Ekvadoro), kiu ne povis vojaĝi al la kongreso kaj kies propono resumiĝas jene :

- a) organizi kursojn de Esperanto en la blindulaj institucioj;
- b) kiam eble, fondi grupojn inter la blinduloj esperantistaj;
- c) starigi rilatojn kun la Ligo Internacia de Blindaj E-estoj;
- d) stimuli publikigon en Brajla skribo de libroj en E-o;

Post pritrakto de ĉiu punkto, unu post la alia, kaj post fruktodona opini-interŝanĝo, la Komisiono redaktis kaj unuanime aprobis rezolucion, kiu estis pritraktita la 6-an de la asembleo de la kongreso. Ĝi estis unuanime aprobita. Jen la 5 punktoj de tiu rezolucio :

- 1) organizi kursojn de E. ĉe la blindul-institucioj en ĉiuj amerikaj landoj, invitante neblindajn studentojn al tiuj kursoj por stimuli la plej fortajn sociajn interrilatojn inter la blinduloj kaj vidantojn.
- 2) faciligi la fondiĝon de blindulaj grupoj E-istaj ĉe la blindul-institucioj de ĉiu lando; ili subtenu daŭrajn kulturajn interŝanĝojn kun la E-istaj centroj de la tuta mondo.
- 3) rekomendi, ke, kiam la kreskado de la blindulaj grupoj E-istaj permesos, La Amerika Konsilantaro por Blinduloj estigu efektivan interligon kun la Ligo Internacia de Blindaj E-istoj, por atingi inter aliaj bonaĵoj, la uzon de la E-ista kupona pagoservo, kiu faciligos la akiron de didaktika kultur-materialo el aliaj landoj.
- 4) interesigi ĉiujn Brajl-gazetojn de Ameriko, por ke ili diskonigu la avantaĝojn de

E-o; kaj same ankaŭ, laŭeble, ke ili enkal-kulu en siajn eldonistajn planojn la pre-sadon de tekstoj kaj broŝuroj en la nomita lingvo.

5) rekomendi al ĉiuj registaroj en Ameriko la enkondukon de la kompleta lernado de moderna fremda lingvo, krom Esperanto, en ĉiuj oficialaj blindul-institucioj

(Laŭ raporto de Prof. Manuel Fernandez Menendez, reprezentanto de I.L.E.I. en Urugvajo).

## Internacia Kurso de LATINIDA FILOLOGIO kaj PIRENEA KULTURO

(Andora Princlando, 24 Aŭg. - 8 Sep. 58)

Sub la alta patronado de la Generala Konsilio de la Andoraj Valoj okazos, denove en 1958, internacia kurso kun jena programo :

1) *Latinida Filologio* : a) praktikaj kursoj de la kataluna, okcitana, franca kaj hispana; b) lingvistiko; c) literaturo; d) tekstokomentado.

2) *Pirena kulturo* : a) etnografio; b) historio; c) institucioj; d) art-historio.

3) *Aktualaĵoj* : a) ideologio; b) politiko kaj ekonomio; c) aplikata scienco.

Krome : Muzikologio, Kino-Forumo, Fes-toj, Vizitoj, Ekskursoj.

La klasoj okazos ĉiutage de la 9-a ĝis la 12-a matene kaj de la 6-a ĝis la 9-a vespere. La posttagmezoj estos do liberaj por ekskursoj en tiu alloga montara pejzaĝo de tiu unika katalunlingva teritorio.

La lecionoj estos gvidataj en la lingvoj kataluna, okcitana, franca kaj hispana. Plena programo kun nomo de la profesoroj, detalitaj materioj, ktp... estu petata de la sekretarioj.

Eblas loĝi sub tendoj, en apartaj domoj aŭ en hoteloj.

Enskribiĝo : 200 pesetoj.

Sin turni al : *Secretaria del Curs Internacional, Casa de la Vall, Andorra la Vella, Andoro.*

## RETORIKO de Ivo Lapenna EN DUA ELDONO!

La unua eldono de tiu bona verko rapide elĉerpigis. Nun aperas dua eldono tute reviziita kaj ampleksigita (320p. anstataŭ 211p.; pli granda formato). Nepre antaŭmendu : ĉe la aŭtoro : 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo. (Bindita : 18 ŝil., broŝurita : 15 ŝil.).

# Muelejo de la Metilernantoj

## ĈALEDO ESPERANTO

La Internacia laborkampo starigota, kiel ĉiujare en la Muelejo de Piot apud Cheniers (Creuse) Francio — unue, komencos konstruadon de ĉaledo « Esperanto ».

Jam volontuloj el 12 landoj enskribiĝis : de Pollando ĝis Hispanujo tra Jugoslavio.


Kion ni havas por konstrui la ĉaledon ?

Unue 200 malnovajn elektraĵojn stangojn malfacile veturigitajn tien kaj pordojn kaj fenestrojn portitajn el ĉiuj anguloj de la departemento.

Due...  
nenion...  
eĉ unu centimon.

La ĉaledo devos esti konstruita kaj ĝi estos.

Ni lanĉas alvokon por helpi, por ke estu pli bela la domo de tiu internacia lingvo kiu alportas klaran kaj simplan eblecon de interkomprena-



*Malĉekstre* : frontparto de la grandega fest-salono.

*Meze* : la malnova muelejo rekonstruita.

*Dekstre* : la nova manĝejo.

*Funde* : tendoj dum restado.

do al ĉiuj kiuj tra la mondo sin serĉas kaj reciproke etendas la manojn.

Vi povas doni tagon da laboro aŭ pagi nutraĵojn por volontulo aŭ ilon eĉ malnovan ĉar, bedaŭrinde, ĉiam mankas iloj por ĉiuj brakoj.

Se vi povas fari nenion almenaŭ venu kaj rigardu surloke tiujn gejunulojn kiuj transsaltis la barilon de la paroloj kaj bonintencoj por ekagi.

Venu kaj vidu kiel de post 6 jaroj kaj per 50.000 horoj da libervola laboro gejunuloj pruvis ke « konstrui estas unuigi ».

C. CHAREILLES.

**Ni alvokas speciale la esperantistojn el ĉiuj landoj, ili venu por helpi,** por ke dum la konstruado ĉiam aŭdiĝu nia lingvo por ke la laborkampo fariĝu vere internacia kaj esperantista. Tiuj kiuj ne povos veni por labori sendu ion (monon, objektojn por dekoracii, librojn...) ke ekde la komenco la ĉaledo vivu.

Kondiĉojn pri la restado kaj pliajn informojn sendos : G. MUSSIER, Ecole du Jeu-de-Paume, Moulins (Allier) Francio.

## SOMERAJ ESPERANTISTAJ LERNEJOJ DE G. E. E.

La konata franca « Grupo de Esperantistaj Edukistoj » (G.E.E.) organizas dum tiu-ĉi somero du esperantistajn renkontojn.

Unu okazos en LA TRANCHE-SUR-MER (Vendée) de la 4-a ĝis la 25-a de aŭgusto, kaj entenos kursojn por komencantoj kaj progresantoj.

La dua okazos en BESANÇON (Doubs) de la 10-a ĝis la 31-a de aŭgusto. Tiu-ĉi estos Internacia Kultura Ferio por jam spertaj esperantistoj, kaj entenos superan kaj perfektigan kursojn.

Aliĝkotizoj: 1.800 F. por unu persono, 3.000 F. por du samfamilianoj.

Informojn petu, kaj aliĝkotizojn sendu al:

S-o BIDOIT, 6, rue de la Paix - BAUGÉ (Maine-et-Loire).

Turismajn informojn pri BESANÇON, vi povas ricevi pere de:

S-ino TRESORIER, 2, rue des Lilas - BESANÇON (Doubs).

## ATENTU

Anoncoj, reklamoj por FRANCIIO, vi aperigu en « Esperanto et Culture », eldonnumero 1000 — Skribu al: Fino G. JOUBERT, 21, rue Regnault — ST-QUENTIN (Aisne) FRANCIIO — Samaj kondiĉoj kiel por anoncoj en I.P.R. — PĈK: LILLE n° 3041-30.

I. P. R. - PROVSENDOJ

Sendu adresojn de interesotaj personoj (geinstruistoj) ne abonantoj cele al provsendaĵoj al:

S-ro DELAGNEAU — Avrolles par ST-FLORENTIN (Yonne) FRANCIIO

## ANONCETOJ

### PREMI-DONA INTERNACIA EKSPOZICIO DE INFANDESEGNOJ

Esperanto-klubo ĉe Kleriga Domo en Znojmo, Ĉeĥoslovakio, organizas ekspozicion de desegnoj por infanoj ĝis-15-jaraj. La ekspozicio okazos de la 1-a de Junio ĝis la 27-a de julio 58. Estos premioj por la diversaj aĝo-grupoj. Urĝe petu la regularon kaj partoprenigu viajn lernantojn! Turnu vin al: IEID, Znojmo, Ĉeĥoslovakio. Demando al IEID: kion vi nomas « normigita formato »? Prefere indiku la dimensiojn per centimetroj: nur tio estas konata de ĉiuj.

### « ESPERANTO KAJ GEONISMO »

Internaciaj FERIAJ Kursoj (10-17 Aŭg. 58)

En la ekstreme plaĉa regiono de Münchenwiler ree okazos sub direktado de D-ro William Perrenoud la internacia ferio dum kiu estos pritraktata la Oran Metodon, metodo instrui Esperanton surbaze de ĝiaj 300 bazaj elementoj, kaj la problemoj de Geonismo kiu klarigas la idean enhavon de Esperantismo. Petu la belegan prospekton kun programo de: Svisa Esperanto-Instituto, Breitenrainstrasse 12, Bern.

### INTERNACIA REGISTRO DE LA MONDCIVITANOJ

Nur unu adreso por esperantistoj kiuj deziras ricevi unufojon por ĉiam la legitimilon de Mondcivitano: F-no Gaby Tréanton, Ecole Publique de Filles, Lanvellec (Côtes-du-Nord), Francio. De ŝi vi ricevos informfolion. Eblas interŝanĝi malnovan nacilingvan legitimilon kontraŭ nova esperantlingva.

### GEOGRAFIA LERNILO

Nia samideano Branimir PIPINIĆ okklasa lernejestro en Hraščina-Trgovišće, Jugoslavio, imagis geografian lernilon.

Konsiderante, ke psika nivelo ne estas tia ĉe gelernantoj, ke ili povas el diverskoloraj mapoj prezenti al si reliefon, li proponas tiun lernilon. Ĝi konsistas el verda tabuleto (ĉbenajoj) kaj el brunaj reliefaĵelementoj por montaroj.

La lernanto mem aranĝas sur la verda tabuleto montar-erojn, bluajn laĉojn (riveroj), nigrajn laĉojn (fervojoj) ktp.

Studado aktiva kaj efika kiun la gelernantoj ŝatas.

S-ro PIPINIĆ respondos al ĉiuj demandoj. Skribu al: ŝkolski gervis Ilica 28. ZAGREB. Jugoslavio.